



世界语诗词格律

胡 国 柱

黄石市世界语协会

Esperanta Metriko

Guozhu



Huangshi-a Esperanto-Asocio

1 9 8 3

胡国柱

世界语诗词格律

黄石市世界语协会出版

湖北省英山印刷厂印刷

开本787×1092 1/32 字数140千字

1984年1月新1版

内 容 提 要

本书以中国世界语者为对象，全面介绍了有关世界语诗歌格律的各种知识。讲解系统详明；例子收罗丰富，而且大都引自各国著名世界语诗人的作品。书末附有简明诗韵集。可用作学习世界语诗歌的入门读物，也可供从事写诗，译诗的世界语者作为参考手册使用。

Dediĉe al

ĉina esPerantisto

kiu volas

LEGI

VERKI

aŭ

TRADUKI

esPerantan Poezion

Invito

Wang Chongfang

Jen libro eta — verk' valora,
frukto de l' fera diligento.
Kun persisteco, en silento,
al ĉi sin donis jun' aŭtora.

Ĝin ŝatu do kun amo kora
kaj legu vi, metrik-studento.
Jen libro eta — verk' valora,
frukto de l' fera diligento.

Klarigo kaj regul' rigora
kondukos vin al vers-talento;
lerninte ilin kun atento,
vi eble iĝos bardo glora.
Jen libro eta — verk' valora.

1982—07—16

Zhengjiang

Antaŭparolo

Armand Su

La verko "Esperanta Metriko" de Guozhu estas tre valora libro kaj la unua tiaspeca libro en nia Ĉina movado.

Antau pli ol 10 jaroj mi legis ĉin unuafoje kaj estis ege kortuŝita de sindediĉo de Guozhu al Esperanta poezio. Kvankam la verko estas verkita surbaze de "Lingvo, Stilo, Formo" de Kalocsay kaj aliaj ĉefaj primetriakaj verkoj, tamen la verko estas miksitita kun ĉina poezio. Tra ellaborado kaj tradukado la verko estas speciale adoptita por ĉinaj poeziamantoj.

S-ro Guozhu laboris super esperanta poezio jam delonge kaj akiris multajn sukcesojn en tradukado. Lia sindediĉo al esperanta poezitradukado estas vaste konata en tuta Ĉina movado.

Kvankam mi aŭdis lian nomon jam delonge, tamen ni renkontis nin nur foje en 1981, kiam li sukcesis min viziti en decembro. Ni intime babilis

ĝis nokto. Li lasis al mi tre fortan impreson.

Pri reeldono de tiu ĉi verko mi ege ĝojas kaj mi tutkore deziras al tiu ĉi nova eldono kompletigita multajn sukcesojn. por ĉinaj poeziamantoj ĉi estas vera trezoro! Ĉiuj poeziamantoj el ĝi elĉerpos utilan instruon kaj konsilon!

1983—01—01

Tianjin

Prefaco

Ikso

Esperantujo estas meritplene nomebla lando de poezio. Tion pruvas ankaŭ la fakto ke ne malofte komencanto, nur kelkajn monatojn kontaktinta kun nia lingvo, jam havas feliĉon ĝui nian poezion aŭ eĉ mem ekprenis la plumon por ion provi. Kompreneble ne ĉies provo montriĝis sukcesa, sed se ni komparus similan situacion ekzemple de la angla lingvo, ni restus plene optimismaj. Se ankaŭ mi iomete konas la metrikon de Esperanto kaj sekve aŭdacas plimalpli versi en ĝi, kiel amatora esperantisto, mi devas konfesi, ke mi scias absolute nenion pri la angla metriko, kiel profesia lektoro de la angla. Ĉu mi ne amas la sorĉajn strofojn de Shakespeare, Byron, Shelly kaj Keats? Ne! Mi amas ilin. Eĉ ardege. Sed kion fari? Dum mi ĝuis aŭ eĉ parkere deklamis kelkajn gemojn el la klasika angla poezio, mi restis nur erarvaga blindulo en la labirinto de ties teorio. Por milionoj da ĉinaj instruistoj kaj studantoj de la angla estas malfacilege aŭ simple

neeble trovi eĉ unu referencan libron pri la angla metriko. La samo verŝajne okazas ankaŭ en la rondoj de la rusa, germana aŭ aliaj fremdaj lingvoj. Do ni devas ĝoji kaj fieri, ke ni, ĉinaj esperantistoj jam nun posedas taŭgan ŝlosilon por la trezoro de nia grandioza poezio, kiun kultivis kaj kultivas plu talentoj de la plej diversaj nacioj.

Libron, same kiel homon oni taksu ne laŭ la ekstera aspekto, sed laŭ la interna kvalito, menso aŭ animo. La viamane entenata modesta bruŝuro ne nur estas "frukto de l' fera diligento" de la aŭtoro, sed ankaŭ estas enkorpiĝo de lia profunda amo al Esperanto kaj veraj esperantistoj. Por kapabli aprezi esperantajn poemojn, la aŭtoro komencis fosi sulkojn tiuflanke dum la plej severa tempo de la dekjara katastrofo. Li voris ĉiujn materialojn kiuj estas nur akireblaj, ofte manskribe kopiis ilin de la unua litero ĝis la lasta. Li studis kaŝe, riskoplene, sinforgeŝe en ekstreme malfavoraj kondiĉoj, sed la rekompenco estis, ke li fine komprenis la misteron de la Esperanta metriko. Kaj tio eble estis unu el liaj maloftaj konsoloj dum tiuj mallumaj tagoj. Mi estis bonŝanca, ĉar dum mi diskutis aŭ interkonsiliĝis pri iaj akademiaj problemoj kun la aŭtoro, la lumo ĵetis ankaŭ sur min, lian longjaran amikon. Tiutempe ni ofte

aranĝis kaj tre ŝatis tranoktajn babiladoj ĉu endome ĉu riverborde, kiuj inspiris nin ambaŭ. Baldaŭ mi sentis ke ankaŭ mi iom post rom allogiĝis al la miraklo de nia poezio kaj decidis oferi min al ĝi. Mi povas diri, ke ĝuste la unika ekzemplero de *Parnasa Gvidlibro* pruntedonita de estimata Tikos kiun ni amdaŭ manskribe kopiis kaj tiu ĉi libro, en sia manuskripta kaj mimeografita formoj, inicis min al kaj kovis mian ĉamon por la Esperanta poezio. Ĝi nun do malŝlosu la pordegon de la poezia trezorejo de nia lingvo por la vasta ĉina esperantistaro.

Post zorga kompara studo mi kuraĝas aseriti, ke la libro ne estas malpli valora ol la fama *Parnasa Gvidlibro*. Trafa poemcitado kaj konciza ekspliko pri la nova teorio de Novzelanda poeto donis al la jam brila brodaĵo belajn floretojn. Sed pri ĉio konvinkiĝu kompreneble la legantoj mem.

La libron forĉis severaj tagoj dum longa tempo. Ĝi povas vidi lumon nur post la Tria Sesio de la Dekunua Kongreso de ĈKP. La tempo pravas ke en la Ĉina movado ne mankas libroj kiuj meritas eldonon kaj renkontas bezonon de la ĉina esperantistaro. La tempo pravas ankaŭ, ke en la Ĉina movado ne mankas veraj esperantistoj — agloj altflugaj super pseŭdoesperantistoj — muŝoj, iaj hipokritaj egois-

toj , tiel indigne kondamnitaj de la granda revoluciisto, pensulo kaj literaturisto Lusin. Mi kredas ke ĉuste ĉi tie kuŝas la espero de la Esperanto-movado en nia patrolando. Tiu ĉi flamo de espero estas neniel estingebla ĉu de feroce persekutado de "Kvarpersona Bando" , ĉu de malicaj kalumnioj de falsaj "esperantistoj" aŭ , kiel oni populare ilin nomas , esperantonmanantoj.

Mi subite memoras ke kvazaŭ antaŭ pli ol jardeko mi provcele pentris serion da portretoj por niaj movadanoj kiujn mi tiam persone konis, tre mallerte imitante la faman "*Rimportretoj*" de K. Kalocsay. Inter la finitaj portretoj verŝajne troviĝis tiu de Guozhu. Post kaosa kaj nervostreĉa traserĉo de la malnovaj paperoj , mi efektive trovis ĉin. Mi tuj decidis, ke la portreto ne arkaikis kiel unu aŭ du aliaj. Ĝi plene freŝas. Kaj eĉ pli brilas. Mi do ne hezitis eĉ sekundon por preni ĉin por finiĝo de tiuj ĉi linioj.

Rimportreto III

*Guozhu—simbol' de l' verda koro,
la verdan flamon serĉas pene
kaj dian fajron avid-prene
ekŝtelis jam de l' knaba horo.*

*Inter plej indaj kun mondgloro
briladis lia pentro geme.
Guozhu—simbol' de l' verda koro ,
la verdan flamon serĉas pene.*

*Sed per sangsputo kaj fervoro
ĝardenon akvas li zorgeme
por ke ekbrulu sun-serene
carma umeo—ĉina floro.*

Guozhu—simbol' de l' verda koro ,

1983—12—15

Wuhan

Bibliografio

1. K.Kalocsay G.Waringhien
 Parnasa Gvidlibro 1 9 3 2. Budapesto
2. K.Kalocsay
 Lingvo Stilo Formo
 (dua eldono) 1 9 3 1. Budapesto
3. K.Kalocsay
 Eterna Bukedo 1 9 3 1. Budapesto
4. W.Auld
 Esperanta Antologio 1 9 5 9. Stafeto
5. Dekdu poetoj 1 9 3 4. Budapesto
6. Brendon Clark
 Kien la Poezio? 1 9 5 7. The Esp.
 Publishing
 Co.Ltd
7. Kenji Ossaka
 5 0 5 elektitaj poemoj
 el Mannjoo-ŝuu 1 9 5 8. Tokio
8. S.J.Zee
 El Ĉina Poezio 1 9 8 0. EPĈ

Mallongigoj

Z=Zamenhof

Gr=Grabowski

K=Kalocsay

If=Ifigenio (trad. de Zamenhof)

Ha=Hamleto (trad. de Zamenhof)

○ =轻音音节

— =重音音节, 节奏重音

= =重音音节, 语法重音

○ — 4 =四个轻重格音步

阿拉伯数字表明音步重复的次数

▼ =主重音

△ =假想的重音音节

/ =音步界限

// =顿

—— =歇

FK=Fundamenta Krestomatio

Enkonduko

§. 1 一首好的世界语诗歌，除了思想性和意境的完美之外，在形式上应当在节奏(ritmo)、音节数(mezuro)和韵脚(rimo)三个方面达到完全的和谐统一。

§. 2 所谓**节奏**，是指轻重音有规律地交替；
所谓**音节数**，是指每行诗所包含的音节数目整齐，或者有规律地变化；

所谓**韵脚**，是指两个诗行末尾的最后一个重读母音及其之后所随的各字母一致。

让我们先举一小段柴门霍夫的诗为例来说明：

[例1] *En la mondon venis nova sento,*
Tra la mondo iras forta voko,
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko;

这段诗是从每个世界语者都读过的 *La Espero* 中选来的头四行。我们试看它的

音节：这段诗每一行都是十个音节，数目很是整齐。

韵脚：这段诗第一，三两行押-ent-韵(sento-vento)。

二、四两行押-ok-韵(voko-loko)，押韵的两行，从重读母音起，往后的字母完全相同。

节奏：如果我们以一表示重音，○表示轻音，那么，所有这些诗句的轻重音都是按下面这个方式安排的：

—○—○—○—○—○

即：分为五个音步（piedo），每一个音步都由一个重音加一个轻音音节组成（在世界语诗歌中，这种音步叫“重轻格trokeo”），很有规律。

§.3 看了这种各行诗的音节数目整齐划一、押韵和节奏严格的诗歌，我们不由得会想起字数整齐、押韵和讲究平仄的汉语格律诗来。确实，它们是很相似的。

在世界语诗歌中，除了这类严谨的格律诗外，还有一些其他形式的诗歌。譬如有的诗歌并不要求每行诗的音节数目都千篇一律，有的诗并不要求行行都用韵，有的诗歌各行的音步也可以不同……。这些变化，有的是有一定规律的，这时它们很像我们习惯了的（按一定的词牌填写的）“词”；而更多则是作者根据内容的需要而自由创造的。

§.4 可以说，“节奏、音节数、韵脚”应当是写诗和译诗者应当信守的关于诗歌形式完美方面的“三原则”。